

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Ekspozicio en nia urba turisma centro

*okt. 7-8 [Parko Grand Mall en la distrikto Minato-Mirai] ĉe Jokohama Internacia Festo

Ni havis unu tendon por ekspozicio pri Esperanto, al la urbanoj, nome al la vizitantoj en parko en Minato-Mirai, urba turisma centro, okaze de la Festo, en kiu multaj grupoj celantaj internacian kunlaboron montris sian agadon. Iuj grupoj aŭ vendis folklorajn produktojn de aliaj landoj, iuj servis tiean manĝaĵon, sed nia grupo simple disdonis flugfoliojn kaj klarigis pri Esperanto al la interesitoj. Entute 450 flugfoliojn ni disdonis.



Kongreso Japania-Korea, kiun ni partoprenis

*okt. 12-14 [En la urbo Nara] La 2-a Komuna Esperanto-Kongreso de Japanio kaj Koreio (enhavanta la 105-an Japanan Esperanto-Kongreson)



En Nara, iama metropolo de Japanio antaŭ pli ol 1200 jaroj, en moderna kongresa halo okazis la Kongreso, al kiu aliĝis sume 543 personoj, el Japanio, Koreio kaj aliaj landoj.

Nia grupo havis budon en la salono kaj prezentis nian grupon. Niaj membroj, precipe en la kanto-grupo, prezentis kantojn okaze de la Interkona Vespere en la 12a vespere, kaj okaze de la Fermo en la 14a posttagmeze.

← indonezia danco

La 112-a Legokunsido

En la 8a de septembro ni havis la 112-an legokunsidon por "La nanoj en domo kun granda zerkovo" de Inui Tomiko, tradukita de nia membro Itabaŝi Micuko. Partoprenis sep personoj.

Fantazia kaj realisma fikcio "La nanoj en domo kun granda zerkovo"

Mizro Iwaya

Ekzistas kelkaj fabeloj kie aperas nanoj. Korobokkuru verkita de Sato Satoru, Arrietty verkita de Mary Norton kaj aliaj. Tie ni vidas ke ĉiuj nanoj havas memstaran vivmanieron kaj vivas sen helpo de grandaj homoj. Do ili estas apartaj estuloj disde homoj. Nu, en ĉi tiu libro nanoj de zerkovo vivas depende de homoj. Do la vivo de homoj rekte influas ilian vivstaton. Tiusence ni povas diri ke ili estas ne sendependaj sed dependaj de alia "ni" kaj ili spegulas nian vivon. La scenejo estas Japanio en la epoko de la pacifika milito. La milito donis grandan kaj tragikan influon al la vivo de japanoj. Do, laŭ natura fluo de la afero, ĝi donis saman influon al nanoj. Ili estas fakte spegulitaj "ni".

La situacio de la socio antaŭ kaj post la milito estas bone konata de japanoj. Sed eble eksterlandanoj ne bone konas ĝin. Ili povas vidi ĝin per tiu ĉi libro. Kompreneble la socio estis en mizera konfuzo. Sed mi vidas ke la aŭtoro ne sole priskribas ĝin kiel tragikan. La nanoj, kun helpo de indiĝena nano Amaneĵaki, agadas aktive kaj trabatas sian vojon eĉ en plej malfacila tempo. Ankaŭ bonŝanco helpas ilin. La tuta atmosfero de la libro estas relative hela. Tia sinteno de la aŭtoro plaĉas al mi.

Supre dirita tendenco daŭras ĝis antaŭ la fino. Sed fine, mi vidas ian ŝanĝiĝon de la sinteno de la nanoj. Nome ili intencas sendependiĝi de grandaj homoj. Do ili komencis fariĝi "normalaj" nanoj. Kvar nanoj, aperintaj en la novelo, disiĝis al du grupoj. Unu el ili tute sendependiĝos baldaŭ. Tio sugestas al ni ke aperos nova sceno en la vivo de nanoj, kio fakte daŭris en la sekva verko de la sama aŭtoro.

Laste mi aldonas ke la tradukita stilo estas sufiĉe simpla kaj facila. Kiel diris Anna Striganova en la revuo "Esperanto", aprila numero, junaj kaj maljunaj, ĉiuj povas ĝui tiun libron, ĉar ĝia temo estas vasta kaj interesa.

Protektadi la vivojn de nanoj, tenadi la vojon al la paco

Tanigaŭa Hiroŝi

La fabelo estis tre ĉarme impresdona; kaj ankaŭ ĝia originalo.

Ĝia ĉeftemo ŝajnas; *Pene protektadi la malfortulojn estas baze same kiel pene tenadi la vojon al la paco.*

La homa familio Morijama protektas la briti-devenan nanan familion, kiu ne povis vivi sen lakto. En la malfacilega tempo en Japanio antaŭ-Milita kaj dum-Milita, la Morijama-familio pene protektadis la malfortajn vivojn de la nana familio alportante al ili lakton ĉiamaniere ĉiutage.

Kiam *Morijama Tacuo* unue prenis sur sin la taskon protekti la nanojn konfide de brita s-ino *Maklaklan*, li estis 10-jara. La Sinjorino iam antaŭe altetaksis la belecon de japana spirito kaj fine enloĝis en Japanio. Sed en Japanio tiu bela spirito pli kaj pli malaperis kaj kontraŭe militismo fortiĝis. Ŝi bedaŭris tion surgazete, kaj japana registaro pro tio ekzilis ŝin. Ŝi ne povis kune veturi al sia hejmlando kun la nanoj. Al *Tacuo* ŝi konfidis la vivojn de la nanoj.

Tacuo ĉiutage portadis lakton al la nanoj por 2777 fojoj. Kaj la tasko estis heredita de li al liaj familianoj, i.a. al *Juri*, lia filino.

Dum tiuj jaroj Japanio iris sur la imperiisma militisma vojo.

En la komenco de 1943 *Tacuo*, tiam 40-jara, estis arestita pro sia liberalisteco. Kaj la fanatika militismo envolvis ankaŭ lian duan filon. La dua filo diris al *Juri*:

"Malbona estas nia patro, ĉar li estas liberalisto. Alporti lakton al la britaj nanoj estas ne permesite en ĉi tiu tempo. En batalejo mankas lakto por malsanaj soldatoj."

Kontraŭe la edzino de *Tacuo*, patrino de *Juri*, diris al *Juri*:

"Grave estas, ke via patro ĉiutage portis lakton al la malfortaj nanoj. Kaj dum la zorgado al la nanoj naskiĝis en li ideo, ke li ne povas konsenti militon de nia ŝtato. La ŝtato

katenis vian patron. Tia ŝtato estas maljusta. Se ni povos elgardi la malfortajn vivojn de la nanoj, via patro povos reveni.”

Je la kriza militfina cirkonstanco *Juri* fine ne povis enmanigi lakton kaj kuŝis malsana. Tiam savis la vivojn de la nanoj japana mirakla nano *Amaneĵaki*. Protektate de *Amaneĵaki*, la nana familio transvivis la plej malfacilegajn tagojn de la Militfino.

Irisa, filino de la nana familio, senĉese trikadis sepkolorajn rubandojn. La rubando fariĝis pli kaj pli longa. Tiam en ŝia koro abrupte naskiĝis ideo:

“Se mi trikados la rubandon tiel longe, kiel ĝi ĉirkaŭos la terglobo, tiam certe malaperos militoj sur la tero. Por feliĉigi la familion de Morijama paco devas regi la tutan Japanion kaj la mondo devas esti paca.”

Kiam fine la Dua Mondmilito finiĝis, la nana familio revenis al la familio Morijama. La nanaj gepatroj veturis al Britio kie atendis ilin s-ino *Maklaklan* kiu iam konfidis iliajn vivojn al *Tacu*. La nanaj gefiloj restis en Japanio.

Resume al mi ŝajnas, ke ankaŭ la tradukinto s-ino Itabaŝi Micuko asertas, tiel same kiel mi skribis ĉe la komenco:

Pene protektadi la malfortulojn estas baze same kiel pene tenadi la vojon al la paco.

La eljapanigita “La nanoj ...”

Sibayama Zyun’iti

La ĉi-foje elektita romano “La nanoj en domo kun granda zelkovo” estas vaste konata en la japana ‘por-junulara literaturo’ (nomi ĝin ‘infanliteratura’ estas erarige, mi opinias), de la postmilita epoko japana (t.e. post 1945). Kvankam en la novelo ĉefrolas familio de nanoj, kiuj kuŝas en lito el homa cigaredujo, la fono de la rakonto estas Japanio implikota / implikata / implikita en la Dua Mondmilito. La nanoj vivas helpate de infanoj, kiuj alportas lakton: komence tio estis relative facila en Tokio, sed poste la infanoj komencas vivi en intermonta kamparo fuĝinte el Tokio atakata de-aere de usonaj militaviadiloj. Tiu malfacila vivo, kie la infano kaŝe protektas la nanojn, estas detale priskribita. Sed, kvankam malfacil-viva, la infano – fakte knabino *Juri* – ne estas serioze molestata, nek perfortata. Mi, kaj kredeble ankaŭ aliaj legantoj, povas serenkore legadi tiun ĉi libron, ĉar ne okazas serioze tragediaj

aferoj.

Nu, la romano estas traduko, kaj fakte mi estis unu el la provlegintoj antaŭ ol publikigo, mi rakontu kelkajn epizodojn.

(1) Knabo *Ŝin*: En la rakonto, unu familio protektas la nanojn, kaj unu el la familianoj estas knabo nomata *Ŝin*(信). Sed esperantisto pensus, ke temas pri akuzativo de virino, nome ŝi-n. Eĉ alia latinigo *Sin* ja havas alian sencon. Kvankam proponite estis alternativoj kiel *Ŝinn*, *Shin*, kursiva *Ŝin* ktp, fine Itabaŝi Micuko, la tradukinto, elektis la solvon simplan: *Ŝin*.

(2) Aperas planto japane nomata “kanzoo” (萱草), tradukite per “taglilio”. Kontrolinte tradukon, oni eltrovis, ke la nuna Japana-Esperanta Vortaro registras nur alian samnoman planton “kanzoo” (甘草), t.e. glicirizo.

(3) En la libro estis prenitaj plurdekoj da desegnaĵoj el la japanlingva originalo, kaj tio helpas komprenigon de la rakonta fadeneto. Nu, la japanlingva skribo iras vertikale, kaj posta vertikala linio venas maldekstre. Oni legas paĝon de dekstre maldekstren. Tial, se ĉefrolulo(j) kaj malĉefaj rolulo(j) vizaĝ-al-vizaĝe renkontas, ĝenerale ĉefroluloj sidas/staras dekstre kaj vidas maldekstren. Tio mem ne ĝenas legadon. Sed estas interesa eltrovo ĉe tradukado.

Niaj klasoj kaj kursoj

Okazas jenaj klasoj (kutime en [KK])

*Regulaj Klasoj en sabato

(1) Klaso “Eseoj”, por legi “Tamen ĝi moviĝas!” gvidate de Doi Hirokaz

(2) Jokohama Salono. 2 fojojn monate oni legas “Mondo de travivaĵoj”, 1 fojon - libera frazfarado; kaj alian fojon - tradukado laŭ sia plaĉa fonto

(3) Daŭriga kurso, por kursofininto en aprilo, gvidate de Fuse Kentaro

*Regulaj Klasoj en merkredo

(1) Klaso “Belĉielo”, por legi “Kuniberto kaj Kilevamba”, gvidate de Doi Ĉieko

(2) Klaso “eriko”, por legi “Kuniberto kaj Kilevamba” gvidate de Doi Ĉieko

*Neregula Klaso

Klaso “Belflora”: Finlegis nepalan rakontaron “Punkuino”, nun legas “Kuniberto kaj Kilevamba” per la gvido de Doi Ĉieko, du fojojn monate

Eseo

Ĉeĥa korespondanto s-ro J.K.

Murata Kazuyo

Antaŭ ĉirkaŭ 10 jaroj nia korespondado komenciĝis, sed mi ne memoras, kiel mi konatiĝis kun s-ro J.K. Verŝajne per Skype li sendis retleteron. Li estas samaĝa al mi, kaj kiam li laboris kiel inĝeniero pri akvokonduko, li loĝis en la urbo *Usti nad labem* proksime de la ĉefurbo Prago dum 42 jaroj. Li loĝas kun sia edzino M. Post emeritiĝo, li planis loĝi en sia hejmloko, urbo *Strašov*, kampara regiono, rekonstruinte domon.



Temas pri lia Esperanta kariero: li laboris kiel unu el LKK-anoj okaze de la Universala Kongreso en Prago 1996. Sed poste li ne tiel vigle agadas pri Esperanto, nur apartenante al loka grupo (foto), de tempo al tempo prelegas pri sia hobbio, numismatiko (kolektado de malnovaj moneroj) kaj aliaj.



Kiel unu el siaj hobbioj, li kultivas multajn kaktajn en varma vitra kesto mem farita. Tre rimarkinde estas, ke li mem faras Ovojn de Pasko tre belaj kaj delikataj. Liaj familianoj ofte kolektiĝas kaj festas kristnaskan tagon kaj Paskan tagon. Li okupiĝas pri sia ĝardeno, farante kelkajn legomojn kaj diversajn florojn kaj frukt-arbojn. En lia ĝardeno troviĝas eĉ kesto por birdoj. Li havas gefilojn. La filino loĝas kun sia edzo kaj fileto. Lia filo estas dentisto kun sia kliniko en Prago, kaj loĝas kun la edzino kaj du filinetoj.



S-ro J.K. ofte sendas informojn pri sia familio, kaj mi bone konatiĝis kun lia historio, kvankam neniam ni vidis ilin vid-al-vide. La vivo de liaj familianoj tute samas al ni japanoj. Geavoj ĉiam atendas alvenon de genepoj preparante diversajn ludilojn. Ni estas pli intimaj ol kelkaj miaj parencoj, kiuj malofte renkontas nur okaze de budhisma ceremonio.

La plej dankinda afero pri li estas, ke li multe sendas al mi fotarojn (alinome fotoalbumojn) komputile, pri turismo tutmonda, belegaj naturoj, diversaj animaloj, amuzaj konstruaĵoj, raraj artaĵoj, tute ne kalkuleble multaj. Preskaŭ ĉiuj estas faritaj de profesiaj fotistoj, kaj danke al tiuj fotaroj, mi povas turismi tutmonde kaj ĝuas la belegajn pejzaĝojn aŭ fame konatajn artmuzeojn sidante hejme.

Danke al Esperanto mi havas tiel intiman amikon en fora Eŭropo.

(noto de la Redakcio) Tiu ĉi eseo estas mallongigita versio de la prezento de s-ino Murata ĉe "La kunveno raportoj siajn spertojn" en septembro 2018.